



N-ro 1/2007  
18a jaro (2a periodo)

# inter ni dirite

- LA JUNULARA FORUMO

Redaktas: Leif Arne Storset

## Kjære lesar,

NJE byr i desse tider til internasional banneord-konkurranse, og ideane strømyer alt inn. Det var kanskje ikkje uventa at ikkje alle likte dette påfunnet, men Kai Salve Salvesen forsvarar i dette nummeret konkurransen og set både bannskap og konkurranse i rette samanheng.

Send inn dine saftigaste («plej sukaj») påfunn!

Leif Arne Storset,  
redaktør



## Je la barbo de Zamenhof!

Nia sakraj-konkurso (vd. inviton en la lasta numero de IND) vere vekis grandan intereson inter la esperantistoj! Jam venis kontribuaĵoj el multaj landoj, kaj ĝenerale homoj ŝajnas opinii ke la konkurso estas bona iniciato. Sed venis ankaŭ negativaj reagoj, de homoj kiuj opinias ke oni prefere ne sakru kaj ke esperanto-organizo nepre ne instigu al sakrado.

Mi tre bone komprenas tiujn negativajn reagojn – kaj ankaŭ iom samopinias. Oni ja ĝenerale ne sakru. Sakrado signifas ofendadon – je unu grado aŭ alia. Kaj estas bona kondut-regulo ke oni ne ofendu. Tamen, mi opinias ke sakroj estas natura kaj necesa parto de lingvo.



## NE NUR POR «UTILAJ» AFEROJ

Per lingvo oni povas fari multegajn aferojn. Nur pripensu. Kiam vi skribas aŭ parolas vi ne nur informas, argumentas, admonas aŭ ordonas – aŭ faras similajn «utilajn» aferojn. Vi ankaŭ de tempo al tempo diras (aŭ skribas) ion ĉefe por esprimi viajn sentojn (*Kia veteraĉo!*) aŭ por krei aŭ konfirmi ian rilaton kun aliaj homoj (*Saluton! Bona vetero hodiaŭ! Ĉu ne, kara najbaro?*). (Kompreneble ankaŭ tiaj aferoj estas utilaj!) Oni faras tiom da aferoj per lingvo ke verŝajne ne havas sencon provi listigi ĉiujn.

De tempo al tempo oni uzas lingvon por

esprimi ege negativajn sentojn. Mi povas ekzemple diri: *Ho, ne! Jen venas la babilema najbaro!* Aŭ: *Nun mi vere ĉagreniĝis!* Aŭ eĉ: *Mi pensas ke NJE estas ege infanecaj aranĝante tiun sakraj-konkurson!* Sed kelkfoje eĉ la plej piaj inter ni sentas ke tiaj esprimoj ne sufiĉas. Oni bezonas ion pli fortan. Oni bezonas sakron.

### KIO ESTAS SAKRO?

Nu, ĝuste kio estas sakro? Kial *Fek!* aŭ *Diablo!* estas konsiderataj pli fortaj esprimoj ol ekz-e *Ho, ne?* Se mi diras *Fek!* aŭ *Diablo!* por esprimi fortan, negativan senton, mi ne vere parolas pri feko aŭ diablo. Kompreneble! Mi uzas tiujn vortojn nur ĉar ekzistas iu moro en la socio – aŭ en socia grupo – ke oni nepre ne prononcu ilin. Se oni tamen prononcas ilin, tio pli forte efikas ol se oni uzus pli neŭtralan esprimon. (Oni do ne tro ofte sakru. Tiam la tabu-vortoj perdas sian forton!)

En ĉiuj kulturoj ekzistas lingvaj tabuoj. En skandinaviaj landoj oni precipe ne elvoku ne-necese Dion, Jesuon, Satanon aŭ Inferon. En la angla laŭdire pli tabuaj estas diversaj substancoj venantaj de korpaj – ekzemple feko kaj sango. Norvega ministro iam priskribis britan kolegon per la esprimo *drittsekk* («feko-sako»), sufiĉe milda insulto en la norvega. La angla *shit-bag* estas multe pli forta insulto – kaj oni povas kompreni ke iuj reagis. (Do estas utile scii kiuj vortoj estas tabuaj – kaj kiom tabuaj ili estas – kiam oni parolas al homoj de aliaj kulturoj.) En sud-eŭropaj landoj laŭdire seksumaj vortoj estas inter la plej tabuaj (tre ofta sakro en la franca estas *putain* – «putino»).

Kelkaj homoj – inkluzive min mem – estas tiom piaj ke ili (ni) praktike neniam

uzas la verajn tabu-vortojn, sed anstataŭe inventas diversajn surrogatojn. Ekzemple, en la plej suda, iom religiema parto de Norvegio oni diras *Farao!* («faraono») anstataŭ *Faen!* («diablo»). En esperanto oni povas (almenaŭ laŭ Corsetti k.a. 2006) diri *Fak-delegito!* anstataŭ *Fek!*

Sakrado do estas uzado de tabuaj vortoj por esprimi ian fortan, negativan senton. (Oni uzas sakrojn ankaŭ por esprimi pozitivajn sentojn, por emfazi ktp., sed mi pensas ke tia sakrado estas sekundara.) La tabu-vorto povas esti uzata memstare (*Fek!*) aŭ kiel parto de vortgrupo aŭ frazo (*Tiu diabla akuzativo! Donu ĝin al mi, je la Ĉielo!*). Ili povas esti uzataj por esprimi koleron pri io (*Satano! Mi rompis tason!*) aŭ por insulti iun (*Fikulo!*).

### ESPERANTO ESTU VIVA LINGVO

En ĉiuj lingvoj ekzistas tabuaj vortoj. Kaj en ĉiuj lingvoj oni povas uzi tiujn tabuajn vortojn por esprimi negativajn sentojn. Certe estas tiel ankaŭ en esperanto – eĉ se tio ne staras en la Fundamento! Sed ĉar esperanto ne estas ligita al unu specifa kulturo, la opinioj pri kio estas tabua povas varii – kaj tial verŝajne ankaŭ la sakrado.

Oni malofte aŭdas sakradon en esperanto. Tio povas ŝuldiĝi al pluraj aferoj: Unue, esperanton oni uzas precipe por civilizitaj kaj amikaj interparoloj en kongresoj, dum vizitoj al fremdaj landoj ktp. – kaj ĝenerale ne en la ĉiutaga vivo. Due, la esperantistoj estas ĝenerale ne tre sakremaj (mi ne scias ĉu tio estas vera, mi listigas nur eblojn!). Trie, la vortprovizo de esperanto estas ankoraŭ limigita. Mankas bonaj, trafaj sakroj por okazoj kiam estus nature sakri.

Mi esperas ke esperanto restos lingvo

de civilizita, amika interparolado kaj ke la esperantistoj restu ne-sakremaj, ĝentilaj homoj. Sed se esperanto estu riĉa, viva lingvo, devas ekzisti pli-malpli pretaj manieroj esprimi ankaŭ fortajn, negativajn sentojn. La tabuoj certe jam ekzistas. Sed ili eble ankoraŭ ne fariĝis sakro-vortoj. Per la konkurso NJE volas kaj registri kiaj tabuoj kaj sakroj (jam) ekzistas en esperanto kaj

inspiri al invento de novaj, trafaj kaj sukaj sakroj.

Kai Salve Salvesen

**SE VI VOLAS LEGI PLI:**

Corsetti, Renato k.a. (2006): *Knedu min, sinjorino. Tabuaj kaj insultaj esprimoj en Esperanto.*

Thaumiers: *La KancerKlinikoteko*

# Pondus

Grupo Esperantista de Trondheim multe amuziĝis pri tradukitaj bildstrioj de la popularega Pondus (La norvega Pondus-magazino havas en 2007 eldonkvanton de ĉ. 110 000, kaj la strioj aperas en pli ol 100 gazetoj en kaj ekster Norvegio). La figuro de Frode Øverlie havis grandan sukceson, kaj haveblas en multaj lingvoj; danke al Judith Parelle Abrahamsen, nun ankaŭ en esperanto! Legu pli pri Pondus ĉe <http://eo.wikipedia.org/wiki/Pondus>

## PONDUS

© Øverli. distr. strandoverli@yahoo.com



## Stikk av!

*Leif Arne Storset*

**Javisst er det moro å læra esperanto, og bruka det til å møta nye, spanande nordmenn. Klårt det er gøy å reisa rundt i Noreg og alltid ha ein klubb å koma til. Men var det det som var poenget?**

For meg var det ei åpenbering å reisa til mitt fyrste IJK i Sør-Brasil sumaren 2002. Måten eg vart møtt på av brasilianarane gjorde at eg voks som person og fekk eit breiare nettverk enn dei fleste på min alder. Eg vil aldri gløyma opplevinga.

Du kan også oppleva slikt! Det er stadig nye arrangement med store tal unge esperantistar. Det største er sannsynlegvis IJK i Vietnam i sumar ([www.tejo.org/ijk](http://www.tejo.org/ijk)). Det er fyrste gongen Vietnam arrangerer, men dersom det kjem like mange som til Kina i 2000, kan vi venta eit par hundre ungdomar. Fleire hendingar finn du på [www.eventoj.hu/2005.htm](http://www.eventoj.hu/2005.htm).

Pengar til reisa treng ikkje vera noko ålvorleg problem. Uhlen's legat ([www.esperanto.no/uhlen/](http://www.esperanto.no/uhlen/)) kan gjeva pengar til den fyrste utanlandsreisa di. Søknadsfristen er nyleg passert, men det kan vera pengar til overs etter hovudrunden. Bur du i eller nær Oslo, kan du



*Den vidkjende Jesus-statuen i Rio de Janeiro*



*IJK er eit godt høve for kulturutveksling. Frå venstre: Daiane, Leif Arne.*



*Smil og blomar i Pato Branco.*

søkja til Kjell og Aase Gustavsens hjelpefond (Oslo esperantoklubb, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo, 22 35 08 94, [inform@esperanto.no](mailto:inform@esperanto.no)). Søk snart, og god tur!

## Venonta IND

Redaktør for neste nummer av *Inter Ni Dirite* er Kai S. Salvesen. Bidrag sendes [kai.salvesen@operamail.com](mailto:kai.salvesen@operamail.com) innen 9. mars.

— FINO DE *INTER NI DIRITE* —